# VERDA INFORMILO, n-ro. 1/2018, 14a de januaro 2018
# GRÜNER BOTE, 1/2018, 14. Januar 2018

**estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo Neubrandenburg (ESN)**
**ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und EVN**
**www.esperanto-nb.de, info@esperanto-nb.de**

## 1. Societa kunveno en decembro

La societa kunveno en decembro 2017 okazis la 13-an de decembro en la gastejo „Uns Eck".

Temaro:

- Kio okazis en 2017 kaj kiu ĉeestis tie?
- 49-a LAMA-kuveno
- datoj por 2017 (Ŝtetina Esperanto-printempo, inform-stando, GEK, SEFT, kurso, 50-a LAMA-kuveno)
- lingvaj ekzercoj pri Kristnasko, Novjaro, solstico ktp.



*Abbildung 1: Vernereto*



*Abbildung 2: Edeltraut*



*Abbildung 3: Birgit kaj Bernd*



*Abbildung 4: Nils kaj Brunjo*



*Abbildung 5: Vernerego*

Ni krome gratulis al Vernerego pro sia okazinta naskiĝdatreveno.




*Abbildung 6: Reneo*


*Abbildung 7: Edeltraut kaj Vernereto*

# 2. Jen ligilo de skajpano

Jam en decembro 2017 Reneo ricevis ligilon al esperanta paĝaro de aziano, nome de Faro. Li estas japana esperantisto, kiu jam ekde kelkaj jaroj organizas esperantlingvajn voĉkonferencojn per Skajpo. Se vi emas partopreni tiajn voĉkonferencojn, bonvolu peti Reneon pri kontaktigo.

Jen la ligilo: https://esperantujo.directory/

# 3. Invito al la unua Societa kunveno 2018

merkrede, la **24-a de januaro 2018** ekde 15-a horo, en la gastejo „Uns Eck“ en NB,

temaro:

- datoj de la jaro,
- ŜEP en Štetino de la **19-a ĝis 22-a de aprilo 2018**,
- Germana Esperanto-Kongreso en Zweibrücken, enkadre de trilanga kongreso,
- Kie kaj kiel oni povas lerni Esperanton? Modernaj metodoj,
- Esperanto estas neŭtrala, se ekz.. estas Eŭropo, ankaŭ EU, plena je konfliktoj, tio havas senperan influon al la Esperanto-movado.
- Prelegetoj,
- lingvaj ekzercoj.

# 4. Pliaj datoj de ESN

- Merkrede, la **14-an de Februaro 2018**, ekde 15-a horo,
- Merkrede, la **21-an de Marto 2018,** ekde 15-a horo,

Tiuj du kunvenoj okazos en la gastejo „Uns Eck“.

# 5. Informstando de ESN

La **unuan de majo 2018** ni denove faros informstandon dum la festo de demokratio sur la ĉefplaco de la urbo Neubrandenburg. Ni serĉas helpantojn kaj petas informi Brunjon.

# 6. Germana Esperanto-Kongreso

La ĉijara Germana Esperanto-Kongreso okazos en la urbo Zweibrücken, enkadre de trilanda kongreso de la esperanto-asocioj de Germanujo, Francujo kaj Luksemburgujo, **de la 18-a ĝis la 21-a de majo 2018**.

# 7. SEFT

Nia tradicia tendaro okazos **de la 14-a ĝis la 21-a de Julio 2018**, sur la kutima tendejo „Campingplatz am Dreeetzsee“.

Bonvolu atenti, ke ĉiu devas aliĝi individue ĉe la tendeja administraro ĝis la 31-a de marto 2018!

# 8. Kurseto

Sabate, la **20-an de oktobro 2018** okazos kurseto pri Esperanto.

Ĝi komenciĝos je la 9-a horo kaj daŭros, kun kelkaj paŭzoj, ĝis la 17-a horo.

# 9. Invito al 50-a LAMA-kunveno

Vernero informis unue pri la 17-a de novembro 2018, sed intertempe proponis ŝanĝi ĝin al la sekva semajnfino, nome la **24-a de novembro 2018**.

Laŭ informo el Berlino eblas tiu ŝanĝo, ĉar en Berlino la ĉijara Zamenhoffesto okazos la 15-an de decembro 2018.

# 10. Kantoj en Esperanta traduko

Antaŭ kelkaj tagoj Reneo trovis hazarde du esperantajn tradukojn de alilingvaj kantoj.

- https://www.youtube.com/watch?v=eUwQvfANl48 // Imagu (Imagine) - John Lennon
- https://www.youtube.com/watch?v=exIDp2vlkmw // Hello (Adele Cover)

Reneo esperas, ke la ligiloj ne subite perdiĝos. Se tamen io malaperas, bonvolu informi lin tujtujege. Eble li ja retrovos ion.

# 11. Kiel tajpi esperante per komputilo?

Por legantoj, kiuj emas tajpi esperante per sia komputilo, jen du pliaj ligiloj, kiujn nia aŭtoro trovis antaŭ kelkaj tagoj:

- http://komputeko.net/vindozo.php // Vindozo kaj Esperanto
- http://komputeko.net/linukso.php // Linukso kaj Esperanto

Pliaj informoj pri tio jam ekde kelka tempo legeblas en nia societa paĝaro en http://esperanto-nb.de/tekniko/literoj2.html (germane: http://esperanto-nb.de/tekniko/literoj.html)

# Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.
tlustulimu@web.de (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse: rene_philipp_ntz@gmx.de!)

Geschäftsstellen
LAMA, Landesverband MV
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29/0705
Tel. 0395 422 13 98
Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB, Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC: NOLADE21NBS
e.-Brief: info@esperanto-nb.de

Esperanto-Verein Neubrandenburg e. V. (EVN)
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705
Tel. 0395 422 13 98
e.-Brief: info@esperanto-nb.de